

FOTO DE P. KOCJANCIC: „BAMBI”




INTERNACIA LERNEJA ESPERANTO-REVUO

SUB AŬSPICIO DE ILEI

APRILIO 1974



1-A JARO N-ro 3



VIVU LA T-A DE MAJO



INTERNACIA FESTO DE LA KREA LABORO!



## *Neg<sup>2</sup>, degelu<sup>2</sup> de sur tero*

*Neg<sup>2</sup>, degelu de sur tero,  
malaperu do,  
venu, venu, ho somero,  
ne prokrastu<sup>3</sup> tro!*

*Jam la stal<sup>4</sup> al ŝaf'id'eto  
plenas de enu<sup>5</sup>,  
fojno<sup>6</sup> al la vir'boveto  
nun ne gustas plu.*

*Songas pri herbej<sup>7</sup> bovino  
jam kun maltrankvil',  
revo de kampar'knabino —  
beroj, balancil<sup>7</sup>.*

*Neg<sup>2</sup>, degelu de sur tero,  
malaperu do,  
venu, venu, ho somero,  
ne prokrastu tro!*

*El la estona Hilda Dresen*

LJUBA BOJAĜIEVA

## *Pasera<sup>8</sup> kanto*



*Ĉio floras, gaje estas,  
la printempon oni festas.  
De mateno ĝis vespero  
kante ĉirpas<sup>9</sup> la pasero:*

*Ĉik-ĉirik, ĉiri-lik,  
ĉiri-ĉiri-lik.*

*Flugas muŝo<sup>10</sup>, flugas kulo<sup>11</sup>  
en la bekon<sup>12</sup> de l' ĉasulo.  
Sata, vigla dum somero,  
gaje ĉirpas la pasero:*

*Ĉik-ĉirik, ĉiri-lik,  
ĉiri-ĉiri-lik.*

*Ne plu lumas varma suno ...  
Pluvas ... venis jam aŭtuno.  
Vento blovas kun kolero,  
triste<sup>13</sup> ĉirpas la pasero:*

*Ĉik-ĉirik, ĉiri-lik,  
ĉiri-ĉiri-lik.*

*Vintro regas. Malvarm'igas.  
Ĉio frostas, glaciŭgas.  
Sopirante<sup>14</sup> pri panero  
plore ĉirpas la pasero:*

*Ĉik-ĉirik, ĉiri-lik,  
ĉiri-ĉiri-lik.*

1. el'stara estona verkisto (1864—1913)/ 2. iĝu flua pro varmeco/ 3. venu poste anstataŭ nun/ 4. loĝejo de dom'bestoj/ 5. malagrabla humoro pro nenio'farado/ 6. seka herbo kiel manĝaĵo por bovoj/ 7. ludilo — sidilo, kiu pendas per ŝnuroj kaj iras antaŭen-malantaŭen/ 8. pasero: ordinara griza birdeto/ 9. parolas kiel pasero/ 10. malutila somera flug'insekto/ 11. flug'insekto, kiu akre pikas/ 12. buŝo de birdo/ 13. malĝoje/ 14. kun forta deziro.

La proksima numero de Juna Amiko aperos en septembro 1974.  
NUN ABONU POR LA 2-A JAR'KOLEKTO (3 numeroj)!  
NI DEZIRAS AL VI AGRABLAN LIBER'TEMPON!


Ĉu vi konas la fabelojn de *Hans Christian* (:kristjan) *Andersen*? Ili estas konataj<sup>1</sup> en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo. Tiel la infanoj, kiel ankaŭ maturaj homoj amas ilin pro la profunda saĝeco pri la vivo. (Liaj fabeloj estas aĉeteblaj ankaŭ en Esperanto, en la traduko de *Zamenhof* mem.)

*H. C. Andersen* naskiĝis en la jaro 1805, en tre malriĉa familio,



kaj havis malfeliĉan junecon. Li ankoraŭ estis infano, kiam iu sinjorino antaŭdiris, ke iam lia naskiĝ'urbo honoros<sup>2</sup> lin per lumigado. Kaj tio vere okazis, en lia 70-a naskiĝ'tago.

Danio estas la plej malgranda el la Skandinavaj landoj. Gi okupas 43 000 km<sup>2</sup> (kvadratajn kilometrojn), sed en Danio loĝas 4,8 milionoj da homoj, tio estas po





# La hejm-lando de H. C. Andersen

110 personoj en km<sup>2</sup> (dume en la ceteraj Skandinavaj landoj nur po 10 ĝis 20 homoj).

Danio estas lando sen montoj, kvankam tie troviĝas la „Ĉiel'monto”, kiel la popolo baptis<sup>3</sup> la 157 metrojn altan monteton. Kaj eĉ la „Ĉiel'monton” superas la plej alta pinto, kiu havas 173 metrojn super la maro. Danio konsistas el duon'insulo (*Jutlando*), kaj el 500 grandaj kaj malgrandaj insuloj, kiuj — plejparte — estas kunigitaj<sup>4</sup> per pontoj.

Antaŭ 3000 jaroj jam estis riĉa kulturo en Danlando; sed, poste, la klimato<sup>5</sup> malboniĝis kaj, en la tempo de la popola migrado<sup>6</sup>,




multaj forlasis la landon. Ili iris suden, kaj mortis en bataloj kontraŭ Romianoj kaj aliaj popoloj.

Ni, en Danio, havas unikan arkeologian<sup>7</sup> memoraĵon. Antaŭ ĉirkaŭ 2000 jaroj, oni mortigis viron, kaj jetis lin en marĉon<sup>8</sup> apud la vilaĝo *Tollund* (:tolund). Lia korpo mirinde konserviĝis, ankaŭ la vizaĝo restis sen difektoj. (Rigardu lian foton sur la 6-a paĝo.) Oni povis konstati<sup>9</sup> eĉ tion, ke lia lasta manĝaĵo estis kaĉo<sup>10</sup> el hordeo<sup>11</sup> kaj lino<sup>12</sup>semoj. Tio estas interesa, ĉu ne?

Ankaŭ la nacia flago de Danio (blanka kruco sur ruĝa kampo) meritas kelkajn vortojn. Ĝi estas la plej malnova flago en Eŭropo. Laŭ oni'diro, ĝi falis el la ĉielo la 15-an de junio 1219; kaj, en batalo, ĝi ŝanĝis malvenkon al venko.

Preskaŭ la tuta tero estas kultur'ebla. La ter'kultur'istoj de nia lando fariĝis famaj pri kooperativaj<sup>13</sup> laktejoj kaj buĉejoj<sup>14</sup>.



Danaj ŝipoj troviĝas sur ĉiuj maroj kaj oceanoj<sup>15</sup>. Ili trans'portas varojn al centoj da landoj en la mondo.

La ĉef'urbo de la lando estas *Kopenhago*. En ĝi, kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo loĝas pli ol la kvar'ono de la dana popolo. Miloj da vizitantoj venas ĉiu'jare, por vidi Kopenhagon, ĝiajn muzeojn<sup>16</sup> kaj palacojn<sup>17</sup>. Ili nepre vizitas la mond'faman amuzejon „*Tivoli*”, kaj rigardas la mar'virin'eton en la haveno<sup>18</sup>.

Danio akceptas ĉiun kun sincera amikeco.



*E. Langkilde*

1. kiujn oni konas/ 2. montros estimon al iu/ 3. donis al io aŭ iu nomon/ 4. kiujn oni kun'igis/ 5. la tuto de kondiĉoj pri vetero/ 6. irado de unu loko al alia/ 7. arkeologio: scienco pri pra'tempaj post'restajoj/ 8. profunda vasta koto/ 9. diri, atentigi per rimarko/ 10. densa flueca manĝaĵo/ 11. speco de pan'herbo/ 12. kreskaĵo, utila materialo por la teksa industrio/ 13. komunaj/ 14. mort'ig'ejoj por bestoj/ 15. maregoj/ 16. el'montr'ejoj de valoraĵoj/ 17. bel'egaj domegoj/ 18. loko ĉe mar'bordo, kie ŝipoj al'bord'iĝas.

## Graĵnoj en Vento



Centro: Graĵnoj en Vento  
Ruedes Pins 66 Bienne/Biel 7 Svislando/Suisse  
Poŝtĉekkonto: «Graĵnoj en Vento»,  
Marcel Erbetta, Bienne, IVa 9485



N-ro: 24 3-a Rondo

Date 1. 3 1970



*Ĉu vi ankaj  
deziras*  
**verki gazeton?**

**E**ble vi ne konas la apudan gazeton. Permesu do, al mi, prezenti ĝin.

„*Graĵnoj<sup>1</sup> en Vento*” (*GeV*) aperas en Svislando. Profesoro<sup>2</sup> *Marcel Erbetta* (:marsel erbeta) redaktas ĝin. Li laboras por tio, ke infanoj el diversaj landoj ekkonu unu la alian kaj, tiel ili fariĝu bonaj geamikoj.

Infanoj verkas la artikolojn, la desegnaĵojn kaj la aliajn laboraĵojn



por la gazeto. (Simila internacia gazeto ne ekzistas en la tuta mondo!)

Pri kio ili sciigas la amikojn? Ili informas laŭplaĉe pri siaj aventuroj, ekskursoj, lernejo k. t. p. Kelkaj lertuloj provas verki eĉ versaĵojn.

Poste, ĉiu infano volonte legas kaj rigardas la verkaĵojn de eksterlandaj amikoj. Bedaŭrinde, ĉi tie ni ne povas (pro manko de spaco kaj koloroj) montri al vi la interesan enhavon de GeV, en kiu ĉiu ilustraĵo<sup>3</sup> estas originala<sup>4</sup>.

Estos plej bone, se vi ekkonos ĝin propra'okule. Kiel tio estas ebla?

Ĉiu grupo, kiu laboras por GeV, ricevas, el ĝi, unu ekzempleron<sup>5</sup>.

Kiel kunlabori? Diru al via Esperanto-instruisto, ke vi volas fariĝi „ĵurnalisto”<sup>6</sup>. Priparolu, kion vi povus prezenti al viaj ali'landaj amikoj. Se, inter vi, troviĝas lertaj desegnantoj, ili ilustru la artikolojn!

Poste, vi aŭ via gvidanto trovu iun, kiu volonte maŝin'skribos la artikolojn en 20 ekzempleroj. Almetu 20 desegnaĵojn, aŭ pentraĵojn, kaj sendu ilin al *s-ro Marcel Erbetta*, Rue de Pins 66, CH—2503 BIENNE/BIEL, *Svislando*.

Post kelkaj tagoj, vi ricevos la belegan gazeton (3-foje jare), en kiu — kune kun via laboraĵo — vi trovos la verkojn de viaj diverslandaj geamikoj.

GeV estas dufoja ĝojo. Unue, ĝi estigas plezuron dum la verkado, due, dum la legado de la preta gazeto.

Se vi volas scii pli multe, skribu al *s-ro M. Erbetta*. Li ĝojas, kiam novaj junaj esperantistoj akceptas kunlabori.


Mi esperas, ke ekzistas inter vi lernantoj, kiuj volonte komencos tian interesan laboron.

*S-ino G. Ōsz* (:oes)

1. semoj/
2. instruisto en supera lernejo/
3. bildo, kiu prezentas okazaĵon el rakonto/
4. unu'sola
5. peco/
6. homoj, kiuj laboras ĉe gazetoj aŭ ĵurnaloj (ĉiu'tagaj gazetoj).



Desegno el „Grajnoj en Vento”  
*Caubet Jean Luis*, 11-jara knabo

ĈU  AŬ  **reverso?**

Via amiko, al kiu vi prezentas la sekvan artifikafjon<sup>1</sup>, prenu kelkajn monerojn, ekzemple sep.

Ĉiu monero havas *averson* (flanko kun cifero) kaj *reversion* (dorsa flanko).

La amiko skuu la monerojn per ambaŭ manoj, poste, li ĵetu ilin antaŭ si sur la tablon, tiel ke ĉiu monero estu bone vid'ebla.

For'turnu vin, kaj diru al via amiko: „Turnu la monerojn, kiom-

foje vi deziras. Vi rajtas plur'foje turni eĉ la samajn monerojn; sed, ĉe ĉiu turno, diru: *Nun!* Kiam vi laciĝis de la turnado, elektu unu moneron laŭ'plaĉe, kaj kovru ĝin per mano! Poste, mi re'turnos min, kaj — ĉar mi travidas vian manon — mi diros, kiu flanko de la sub'mana monero estas supre.”


Neniu volos kredi al vi. Kaj vere, kiel diveni?

*Unua paŝo:* Post kiam la amiko ĵetis la monerojn sur la tablon, vi subite nombriu la *reversojn*, ekzemple 3.

*Dua paŝo:* Al la antaŭa sumo<sup>2</sup> (ĉi tie: 3) aldonu la nombron de *nun*-oj, ekzemple 6; do:

$$3 + 6 = 9.$$

*Tria paŝo:* Post kiam vi returnis vin, rapide nombriu la *aversonj*, ekzemple 2, kaj aldonu ĝin al la antaŭa sumo:  $9 + 2 = 11$ . Kiam la *fin*a sumo (11) estas





ne'para<sup>3</sup> nombro, tiam la mano kovras *reversion*, kiam ĝi estas *para* nombro, sub la mano kuŝas monero kun *averso* supre.

Atentu!

La rezulto estas ĝusta, kiam en la ludo estas 3, 5, 7, 9, ... mon-

eroj. Se en la ludo estas 2, 4, 6, 8, ... moneroj, *para* rezulto egalas *reversion*, *nepara* — *averson!*

*Konsilo*: Bone rigardu la bildon, faru kelkajn ekzercojn, kaj nur poste prezentu vian „*vid'povon*”. Estas gra-

ve, ke neniu rimarku, ke vi kalkulas en la kampo!

Mi deziras al vi multajn sukcesojn!

G. Kurucz (:kuruc)

1. lerta trompaĵo/ 2. ekz.  $3 + 6 = 9$ ; la sumo estas 9/ 3. nombro ne-dividebla per 2.



## FALIGU KEGLOJN'!

LUDO POR 4 GIS 24 INFANOJ

La ludejo estas ebena placo, 24 metrojn longa kaj 11 metrojn larĝa. Baza<sup>2</sup> linio (0) dividas<sup>3</sup> la placon en du egalajn partojn. Ambaŭflanke de la baza linio desegnu po 4 liniojn: A<sub>1</sub>, A<sub>2</sub>, A<sub>3</sub>, A<sub>4</sub>, B<sub>1</sub>, B<sub>2</sub>, B<sub>3</sub>, B<sub>4</sub>. Inter ili la distanco estu 1 metro!

Sur la bazan linion, starigu 12 keglojn. (Vi mem povas segi ilin el dikaj branĉoj.)

La ludantoj formas du grupojn A kaj B. Ĉiu ludanto havas malgrandan pilkon. Grupo „A” komencas pli da kegloj.

cas la ludon. Sam'tempe, ili rulas sian pilkon, kaj celas renversi<sup>4</sup> la keglojn. Ili re'starigas la faligitajn<sup>5</sup> keglojn sur la linio A<sub>1</sub>.

Sekvas la grupo „B”. Ili faras same.


La ludanto rajtas faligi ankaŭ tiujn keglojn, kiuj staras sur linioj, proksimaj al la alia grupo.

Se keglo atingas la linion n-ro 4, ĝi fariĝas akciaĵo de la grupo „A” respektive „B”.

Gajnas tiu grupo, kiu fine havas pli da kegloj.

S-ino G. Osz (:oes)

A<sub>4</sub> A<sub>3</sub> A<sub>2</sub> A<sub>1</sub> 0 B<sub>1</sub> B<sub>2</sub> B<sub>3</sub> B<sub>4</sub>



1. pupoj el ligno/ 2. fundamenta/ 3. faras onojn el tuto/ 4. kuŝigi ion starantan/ 5. kiujn ili faligis, renversis/ 6. se temas pri la linio: B<sub>4</sub>.

● Kelkaj kluboj jam aliĝis al nia al'voko. Ni kore dankas pro iliaj bonaj proponoj! La nomoj kaj adresoj de la unuaj kluboj aperos en la 4-a numero.

● En via kun'veno, bon'volu pri-diskuti<sup>2</sup> la en'havon kaj aspekton de *Juna Amiko*, kaj sendi al ni viajn opiniojn. Ĉiu informo estas tre ut'la. Proponu ankaŭ, pri kio vi volas legi en la gazeto. Skribu pri interesaj okazaĵoj en via klubo, por ke ankaŭ aliaj kluboj profitu<sup>3</sup> el il'!

● Ĉu via instruisto de geografio<sup>4</sup> interesiĝas pri Esperanto? Ĉu vi montris al li ekster'landajn bild-kartojn, poŝt'markojn, prospek-tojn<sup>5</sup> kaj aliajn interesajojn? Ĉu vi ne povas, el viaj kolektaĵoj, aranĝi en la lernejo ekspozicion<sup>6</sup> pri certa temo: Eŭropo, Hispanio, Nor-da Eŭropo, socialismaj landoj, ĉef-urboj, Eŭropaj maroj, aliaj kontin-entoj kaj multaj aliaj? Se vi sci-povas fotografi, sendu al ni foton pri via bela ekspozicio. Se ĝi estos taŭga, ĝi aperos en nia gazeto.

● Konkurso por klubanoj, kaj por la ceteraj legantoj:

La kolono „A” enhavas la nomojn de ŝtatoj en Esperanto, la kolono „B” enhavas la nomojn de ĉef-urboj. Sed la vic'ordo ne estas la sama en ambaŭ kolonoj. Tio ja estas via tasko: skribi post ĉiu ŝtato la ĝustan ĉefurbon. Sendu la sol-voŝn antaŭ la 1-a de septembro 1974!

Vi tuj ricevos belan bild'karton, kaj la rezulto de la konkurso ape-ros en nia gazeto „*Juna Amiko*”.

LA RUBRIKON<sup>1</sup> GVIDAS:

Josef Chvosta (:ĥvosta)  
Engelsova 289,  
290 01 PODEBRADY  
Ĉeĥoslovakio

Sendu ĉiun korespondajojn  
rekte al tiu adreso!



A	B
1. Aŭstrio	1. Tokio
2. Malajzio	2. Limo
3. Francio	3. Ankaro
4. Peruo	4. Vieno
5. Irlando	5. Karako
6. Ukrainio	6. Kuala-Lumpuro
7. Hungario	7. Beogrado
8. Suomio	8. Teherano
9. Etiopio	9. Abiĝano
10. Japanio	10. Luando
11. Jugoslavio	11. Honolulu
12. Havajo	12. Madrido
13. Uzbekio	13. Bukareŝto
14. Irano	14. Parizo
15. Venezuelo	15. Addis Abeba
16. Turkio	16. Taŝkent
17. Eburna Bordo	17. Kievo
18. Hispanio	18. Budapeŝto
19. Angolo	19. Helsinko
20. Rumanio	20. Dublino

1, parto aŭ angulo en gazeto/ 2. pro-funde pri'paroli/ 3. tiru utilon/ 4. scienco pri la ter'globo, landoj ktp./ 5. fald'folioj kun belaj bildoj/ 6. publika el'montr'ado.



# Ĝis la ĉielo


**R**igardu, sur la apuda foto, la Ostankinan televidan turon de Moskvo. Ĝi estas mond'fama unikajo de la konstru'arto. La kap'turna 533-metra alteco de la pinglo<sup>1</sup>-turo ofte sin kaŝas inter nuboj. Por atingi la stabilecon<sup>2</sup> de la pinglo'konstruajo, sen ia ajn apogilo, oni uzis ĉirkaŭ 40 tunojn<sup>3</sup> da konstru'materialo por la fundamento.

**S**ed ne nur la ekstera formo de la turego estas grandioza.<sup>4</sup> Ĝi estas unika tele-ekipaĵo<sup>5</sup>, en kiu ĉiuj radiofoniaj<sup>6</sup> kaj televidaj aparatoj troviĝas en la sama konstruajo.

**L**a Ostankina turego servas, krom por televidado, ankaŭ por meteorologiaj<sup>7</sup> celoj kaj kiel bel'videjo. Lifto<sup>8</sup>, por 14 personoj, levas la vizitantojn ĝis alteco de 337 metroj. Ĝi pasas ĉi tiun vojon en 57 sekundoj<sup>9</sup>, kun rapideco de 6 metroj ĉiu'sekunde. La lifto flugigas la homojn ĝis la restoracio<sup>10</sup> „Sepa Cielo”, kiu troviĝas en unu el la zonoj de balkonoj<sup>11</sup>. De tie, panoramaj<sup>12</sup> fenestroj ebl'igas vidon al la tuta urbego. Estas ne'ordinara tra'vivaĵo pasigi tie kelkajn horojn, kaj ĝui plezuron pri la panoramo de la 7-miliona Moskvo. Kaj vere, oni ĝuas panoramon, ĉar la „Sepa Cielo” rond'iras. Ĝi faras unu turnon en 40 minutoj.

**S**tarante antaŭ la turo, aŭ vizitante ĝiajn internajn ejojn, kaptas vin sento de grandiozece, kaj vi ne plu dubos, ke vi renkontis, en Ostankino, la konstruaĵon de la estonteco.

1. kudrilo kun kapo anstataŭ truo/ 2. fiksa stato/ 3. tuno: 1000 kilogramoj/ 4. mirinda pro sia grandeco kaj ne'ordinareco/ 5. aparat'aro/ 6. radio-dis'sendaj/ 7. pri'veteraj/ 8. kesto'forma levilo/ 9. 60-ono de minuto/ 10. publika manĝejo/ 11. el'staraj e'etoj sur muro/ 12. ĉirkaŭaj.







ENIGMO

JEN ESTAS 9 ESPERANTO-GAZETOJ!  
EN KIU LANDO ILI APERAS?

Kontraŭ 7 ĝustaj respondoj, vi ricevos premie jar'abonon al „Homo kaj Kosmo”. Sendu la leterojn al *s-ro D. Berndt; Rosenfeld Ring 46; DDR—136 BERLIN. Lim'dato: la 31-a de julio 1974.*

Ĝusta solvo de la liter'enigmo (2-a numero): 1. komparo, 2. forsendi, 3. enigmo, 4. subite, 5. surprizi, 6. posteno, 7. trafi, 8. interesa, 9. antaŭ'hieraŭ, 10. regulo, 11. popolo, 12. eduko, 13. duboj. Nomo de la gajnintoj aperos en la septembra numero.



ABC  
POR KOMENCANTOJ

## Ekskursa kanto

Verkis: *J. Kořínek* (:korjinek) Muziko: *V. Heimlich* (:hajmliĥ)

Gaje

Voj' ni - a gvi - das al ar - ba - ro, mar - ŝa - das ni laŭ  
la - ga bord', plur - o - pe aŭ en ga - ja pa - ro, de  
li - poj so - nas kan - ta vort': Mar - ŝu ni, kan - tu ni,  
ho - la, ho - la hej, ho - la, ho - la hej! ho - la hej!



# KASTORA LETERO

## De J. H. SULLIVAN

*Miaj karaj Kastoroj kaj amikoj!*

*En ĉi tiu Letero, vi trovos kompletan<sup>1</sup> liston<sup>2</sup> de niaj Oraj Kastoroj, kaj ankaŭ la liston de ĉiuj, kiuj atingis pli altan rangon en 1973 (ĝis novembro). Mi esperas, ke ankaŭ via nomo aperos tie! Krome, al la centa dat-re'veno de la naskiĝo de la fama inventisto<sup>3</sup> Marconi (:mar-koni), mi havas artikolon pri li. Mi esperas, ke vi trovos ĝin interesa.*


### NIAJ ORAJ KASTOROJ

Post la komenco de nia Klubo, en 1964, dek-naŭ anoj atingis la rangon de Ora Kastoro. Sep, el ili, estas en Britio, ses en Pollando, du en Ĉeĥoslovakio, du en Francio kaj du en Hungario. La plena „Ora Listo” estas:

Barbara Domanska (Pollando)	1965	Veronika Pannier (Francio)	1967
Zofia Batkiewicz (Pollando)	1965	Mihaelo Cranswick (Britio)	1967
Dénes Pallós (Hungario)	1965	Maria Majerczak (Pollando)	1968
Andreo Lapsa (Pollando)	1966	Marie Howarth (Britio)	1938
Jarek Hlávka (Ĉeĥoslovakio)	1966	Danuta Majerczak (Pollando)	1969
Teresa Bochenska (Pollando)	1966	Shaun McLeary (Britio)	1970
Vlado Zavodsky (Ĉeĥoslovakio)	1966	Susan McLeary (Britio)	1970
Lisbeta Schreiber (Francio)	1967	Patsy Windsor (Britio)	1970
		Susan Purvis (Britio)	1970
		Shirley Waller (Britio)	1970
		Gabrielo Ósz (Hungario)	1973

1. sen'manka, plena/ 2. nom'aro/ 3. kreanto de io nova/ 4. tiuj, kiuj atingis pli altan rangon/ 5. Guljelmo (=Vilhelmo)/ 6. signoj, kiuj havas ian signifon/ 7. longaj metalaj ŝnuroj por konduki elektron/ 8. homo, kiu direktas teknikan laboron/ 9. la plej norda punkto en la mondo/ 10. kiujn oni savis/ 11. ŝipo-neni'iĝo.

**O  
R  
A  
K  
A  
S  
T  
O  
R  
O**



Gabrielo Ōsz (Hungario)

**ARĜENTAJ KASTOROJ:**

*Teodora Ōsz (Hungario)*  
*Janusz Kwapien (Pollando)*

**BRUNAJ KASTOROJ:**

*Christine M. Eddy (Usono)*  
*Christine Fournier (Francio)*  
*Désirée Vogelzang (Nederlando)*  
*Jan Nijman (Nederlando)*  
*Marjan Nijman (Nederlando)*  
*Brian Roberts (Britio)*  
*Csaba Fazekas (Hungario)*  
*Georgina Szanák (Hungario)*  
*Helena Endresz (Hungario)*  
*Anna Hamar (Hungario)*  
*Maria Juhász (Hungario)*  
*Krisztina Szűcsi (Hungario)*  
*Klara Ruzsa (Hungario)*  
*Judita Ring (Hungario)*

GUGLIELMO<sup>5</sup> MARCONI

Antaŭ ĝuste cent jaroj, en aprilo 1874, en *Bolonjo*, Italio, la irlanda edzino de itala sinjoro naskis filon, *G. Marconi*.

Kiam li havis 20 jarojn, li komencis fari provojn en sia hejmo, en la vilaĝo *Pontecchio* (:pontekjo), pri la sendo de signaloj<sup>6</sup>, de unu loko al alia, sen uzo de telefon'dratoj<sup>7</sup>. Unue li provis sendi nur de unu ĉambro al alia; sed baldaŭ li sukcesis sendi signalojn trans pli ol 2 km. Tiel, li estis certa, ke lia eltrovo povos esti tre'ege grava por la homaro.

Ĉar li ricevis malmultan helpon en Italio, la familianoj de lia patrino konsilis al li iri en Anglion, kie li ricevis grandan helpon de poŝta inĝeniero<sup>8</sup> *Preece* (:pris).

Iom post iom, li sukcesis pli-

grand'igi la distancon de siaj sendoj. En 1901, li ricevis en *Novfundlando (Kanado)* signalojn el Anglio.

Tio vekis miron, kaj estis la komenco de granda pli'vast'igo. En 1909, esploristo *Peary* (:pire) sendis radio'sciigon, kiam li atingis la Nordan Poluson<sup>9</sup>. En la sama jaro, ĉiu eksciis pri la valoro de radio, kiam, per la sendo de radio signaloj, 1700 personoj estis savitaj<sup>10</sup> el ŝipo'pereo<sup>11</sup>; kaj en aprilo 1912, kiam la tiu'tempe plej granda ŝipo en la mondo: „*Titanic*” (:titanik) trafis glacio'monton, la uzo de radio savis 705 personojn.

Kompreneble, *Marconi* ne estis la sola, kiu laboris pri radio-el-sendoj; sed kiam ajn oni pensas pri la homoj, kiuj helpis la homaron, certe oni neniam forgesos la nomon de *G. Marconi*.



# Dormas la tendaro

Roluloj: *Petro, Johano, pioniroj*  
Scenejo: *Nokto. Pionira tendaro*

*P:* Halt'!! Kiu vi estas?

*J:* Azeno! Ĉu vi ne rekonas vian gardo'kamaradon<sup>2</sup>?

*P:* En tia mallumo?! Mi ne rekonas eĉ min mem!

*J (laŭte):* Ho jes! La nokta deĵoro<sup>3</sup> estas malfacila.

*P:* Fakte, ĝi estas tia. La tendaro povas tamen dormi trankvile! Ne krii do! (*Ankaŭ li krias.*) Lasu ilin dormi! Ni ja gardas iliajn sonĝojn.

*J (kriante):* Ili sonĝu en trankvilo! Ili ĉiuj meritas ripozon!

*Voĉo el iu tendo:* Kio estas? Kiu kriegas?

*P:* Dormu trankvile! Nenio okazis!

*J:* Jes ja, ĉar estas ni la gardantoj! Ni gardas vin! (*Ili malproksimiĝas per kelkaj paŝoj, poste ili sin turnas, kaj denove renkontiĝas.*)

*P:* Ĉu estas vi, denove?

*J:* Kiun vi esperis renkonti? Estas necese, ke ni marŝu kaj gardu la tendaron. La kamaradoj starigis nin gardantoj, kaj ili nun povas dormi kiel pelto<sup>4</sup> somere.

*P:* Pri mi ili estos kontentaj, kvankam... Ĉu vi rimarkis, ke la nokto estas malhela?

*J:* Mirige! (*Kriante*) Ĉu vi timas?

*P:* Ĉu mi? Tute ne! Mi havas nur fortan deziron dormi.

*J:* Kontraŭ dormemo helpas kantado. Ni kantu! (*Ili ekkantas ion.*)

*Voĉoj el la tendoj:* Kia bruoj!... Kiu bruas?... Kio okazis?

*P:* Dormu trankvile, kamaradoj! Ni gardas vin!



*J:* Timu nenion! Bravuloj<sup>5</sup> gardo-staras!

*P (al Johano):* Eĉ se apro<sup>6</sup> atakus, mi ne vekus ilin. (*Kriante.*) Mi mem akceptus batalon kontraŭ ĝi!

*J:* Mi jam aŭdis, ke timemaj gardantoj vekis la tendar'estron, ĉar ŝajnis al ili, ke fremduloj ŝtel'iras inter la tendoj.

*P (denove kriante):* Ĉu ili havis kordon? Mi ne vekus la lacan tendar'estron, eĉ se leono<sup>7</sup> venus renkonte al mi.

*J:* Bone vi diras! Sed... kion do vi farus al la leono?

*P:* Mi sur'kovrus ĝin per la tendomantelo<sup>8</sup>, kaj ĵetus min sur ĝin tia'maniere! (*Li kovras la teron per sia mantelo, kaj ekkuaŝas sur ĝi.*)

*J:* Ankaŭ mi oferus<sup>9</sup> min por la tendaro! Senhezite<sup>10</sup>! (*Li ankaŭ kuŝiĝas.*)

*P (dormeme, mallaŭte):* Oni enskribus niajn nomojn en la tag'libron de la tendaro: „Heroaj<sup>11</sup> gardistoj eltenis gravan provon!”

*J (jam apenaŭ aŭdeble):* ... ankaŭ en la lernolibron pri historio.. (*Ili komencas ronki<sup>12</sup>.*)

El la tendoj: Kio estas? Kio okazis?

De kie venas la terura<sup>13</sup> bruo?

(En'venas pioniroj.)

1-a p: Ĉu tondras?

2-a p: Ĉu oni pafegas?

3-a p: Ĉu oni atakis la tendaron?

4-a p: Ĉu venas vagonaro?

5-a p: Alarmo!<sup>14</sup> Alarmo!

1-a p (falas sur la dormantojn):

Helpu! Mi falis pro io!

2-a p: Malamikoj venis en la tendaron!

3-a p: Batu ilin!

(Subite, ili ĉiuj lumigas per poŝlampoj al la gardantoj, kiuj ekstaras.)

J: Kio okazis? Kia lumo? Vidu, jam mateniĝas!

P: (dormeme raportas): Kamarado Tendarestro! Mi raportas al vi, ke ni plenumis la noktan gardo'servon. Ni batalis kontraŭ apro kaj leono.

(Ĉiuj ridas el la tuta gorĝo.)

J: Kaj ni vekis neniun!

## LANGO-ROMPILOJ

El'diru rapide sen lang'eraro!

1. Ĉu vere viro vidis vin veni?
2. Petro trovis nur tri ŝtrum-pojn.
3. Tie, ni baldaŭ aŭdis ankaŭ alaŭdojn laŭte kanti.
4. Per siaj novaj ŝuoj, ŝi paŝis nur ses paŝojn.

P: Ni gardis la sonĝojn de la dormantoj!

4-a p: Morgaŭ ni pri'parolos la aferon, nun iru dormi! Ha-ha-ha-hi-hi-hi! (Ĉiuj ridas.)

Laŭ „Esperanto-fak'provo”.

1. ŝarĝ'besto kun longaj oreloj/ 2. amiko, kun'ulo/ 3. labor'servo/ 4. varma vesto el felo/ 5. kuraĝuloj/ 6. sovaĝa porko/ 7. reĝo de la bestoj/ 8. vasta kontraŭ'pluva vesto de gardistoj/ 9. for'donus sin kun ia nobla celo/ 10. heziti: ne povi decidi/ 11. heroo: homo, kiu sin ofertas por nobla afero/ 12. eligi gorĝan bruon dum dormo/ 13. tro laŭta, timiga/ 14. voko al batalo.





# LA UTILOJ DE LA FUMADO

Laŭ „*Heroldo de Esperanto*”

**U**nua'foje, tabako<sup>1</sup> atingis la vilaĝon *Kubaĉi* pere de mezaĝa turko. Li portis kun si, al la foiro<sup>2</sup> de la vilaĝo, plen'plenan sakon da tabako, malfermis ĝin, faris cigaredon<sup>3</sup>, kaj komencis reklamami<sup>4</sup>.

„Alelej, bonaj homoj! Venu, venu, kaj provu! Ĝi kostas nek tro multe, nek tro malmulte! Tiom ĝi kostis ankaŭ al mi. La plej bona tabako estas la turka tabako! Ĝi purigas la buŝon pli bone ol la plej bona skrap'papero<sup>5</sup>! Provo estas sen'paga!



Alelej! alelej! Venu tien ĉi, bonaj homoj! Ekfumu! Fumu, mi petas vin! Supre de vira kapo ĉiam devas troviĝi fumo: fumo de pafila pulvo<sup>6</sup> aŭ tabaka fumo. Alelej! Alelej!”

**L**a loĝantoj de *Kubaĉi* ne sciis tiu'tempe, kia speco de herbaĉo estas la tabako. La viroj venis, prenis la ardantan<sup>7</sup> cigaredon, en'spiris la fumon en la bruston, kraĉis<sup>8</sup> abomene<sup>9</sup>, tusadis<sup>10</sup>, kaj diris:

„Tio mankis al ni! Eĉ pagi monon por sufoki<sup>11</sup> nin!”

**D**ume, la foira tago preskaŭ finiĝis, kaj la turko apenaŭ sukcesis vendi iom.

Li cerbumis<sup>12</sup>, provis uzi ruzon, kaj li komencis dis'krii:

„La fumanto neniam estas mordata<sup>13</sup> de hundoj! — En la domo de la fumanto, neniam naskiĝas filinoj! — La domo de la fumanto neniam estas rabita<sup>14</sup>! — Fumanto neniam maljuniĝas! Mi ĵuras<sup>15</sup>, ke mi diras al vi la puran veron!”

**P**ost kiam la turko vere ĵuris kun mano sur la Korano<sup>16</sup>, la tabako vendiĝis kiel varma pano.

**J**am pasis preskaŭ unu jaro, kiam loĝanto de *Kubaĉi* renkontis tiun saman turkon en la foiro de *Derbent*, kaj li decidis riproĉi<sup>17</sup> lin pro la eldiroj, kiujn li faris pri la tabako.

**S**ed la turko trankvile respondis:  
„Alaho<sup>18</sup> estas mia atestanto,  
ke mi prave ĵuris per la Korano.  
Kial la hundoj ne mordas la fum-  
anton? Ĉar, pro la fumado, la fum-  
anto ne plu estas firma<sup>19</sup> sur siaj  
piedoj, kutime necesas, ke li apogu  
sin per bastono, sekve la hundoj  
timas lin. — Kial, en la domo de  
la fumanto, neniam naskiĝas fil-  
inoj? Ĉar kutime, al fumanto, an-  
kaŭ filoj ne naskiĝas. — Kial la  
domo de la fumanto neniam estas  
rabita? Ĉar la fumanto tusadas kaj  
kraĉadas tra la tuta nokto; la rab-  
istoj opinias lin maldormi, sekve  
ili timas eniri. — Kial la fumanto  
neniam maljuniĝas? Ĉar li nen-  
iam atingas la maljunecon!”

Laŭ araba rakonto Esperantigis:  
S. Constantin (:konstantin)

1. kreskaĵo, kies folioj, en seka stato,  
servas por fumado/ 2. vendo'loko/ 3.  
papera tubeto da tabak'eroj/ 4. mul-  
te laŭdi ion por vendi/ 5. papero kun  
sablero sur unu flanko/ 6. brulema  
polvo de eksplodaĵoj/ 7. tia, ke ĝi brul-  
as sen fajro'langoj/ 8. eligis akvecan  
aĵon tra la buŝo/ 9. malamege/ 10.  
subite kaj brue eligis aeron tra la bu-  
ŝo/ 11. mortigi per for'preno de aero/  
12. rompis la kapon, pensis/ 13. kiun  
vundas hundo per dentoj/ 14. kie oni  
ŝtelis multe/ 15. al'paroli Dion, por ke  
Li kontrolu la veron/ 16. religia libro  
de la mahometana kredo/ 17. akre  
mallaŭdi/ 18. Dio de mahometanoj/  
19. fiksa, certa.



**Malsukcesa  
semajno**

*Dimanĉe mi perdis pupon,  
lunde — la hel'bluan*

*jupon.  
Marde perdiĝis la teko<sup>1</sup>,  
merkrede — hundido Keko.  
La sekva tago: ĵaŭdo  
pasis, ankaŭ, sen laŭdo.  
Malbono min sekvas*

*obsede<sup>2</sup>:*

*Kio okazos vendrede?  
Se perdiĝos frateto*

*Mate,  
ĉu mi lin serĉu sabate?*

*L. Jevsejeva*



**PROVERBOJ**

Printempo semas, aŭtuno rikoltas.  
Ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la  
saĝo.  
Inter faro kaj rakonto staras me-  
ze granda monto.  
Ne defendas oro kontraŭ doloro.  
Kapo estas por tio, ke ĝi zorgu  
pri ĉio.

1. ujo por libroj, kajeroj/ 2. animo-  
preme.



# interesajoj

**ABC**  
POR KOMENCANTOJ

## MIRAKLA<sup>1</sup> PAPERO

Oni fabrikas „miraklan” paperon en Usono. Kiam oni metas ĝin en akvon, aŭ en buŝon, ĝi rapide solviĝas, kaj malaperas sen ia ajn post’signo. Oni jam uzas ĝin por paki kuir’pretajn sekigitajn<sup>2</sup> supojn. La mastrino metas ĝin en akvon kune kun la paper’saketo. Scienculoj antaŭ’vidas vastan uzon de la mirakla papero en malsan’ulo’ejoj kaj komerco.



## VITRA SONORILO

En ĉeĥa preĝejo de montara vilaĝo Harrachov (:harrachov) troviĝas vitra sonorilo. Ĝi estis farita<sup>3</sup> en 1916, kiam bronzo<sup>4</sup> estis necesa por milito. Ĝia alteco estas duono de metro, kaj ĝi pezas 10 kilogramojn.

1. ŝajne ne’klar’ig’ebla/ 2. kiujn oni sek’igis/ 3. oni faris ĝin/ 4. ruĝe-bruna metalo por sonoriloj.

# HAMBURGO ATENDAS



# ANKAŬ LA INFANOJN!



● En tiu ĉi jaro, la 59-a *Universala*<sup>1</sup> *Kongreso de Esperanto* okazos en *Hamburgo*, la plej granda urbo de la *Germana Federacia Respubliko*. La kongresa semajno daŭros de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto.

● En la kadro de la 59-a, kongresos, kiel ku-

time, ankaŭ la infanoj. La *14-a Internacia Infan'kongreseto* promesas belan programon: ekskursojn, sporton, amuzajn vesperojn, konkursojn, ludojn, viziton al la kongreso de la plen-aĝuloj k. t. p.

● Vi ankoraŭ ne malfruis. Se viaj gepatroj (aŭ unu el ili) vojaĝos

al *Hamburgo*, petu ilin afable preni vin kun si. Sub atenta zorgo de divers'naciaj instruistoj-geamikoj, vi ĝuos, dum ronda semajno, la agrablecon de internacia medio<sup>2</sup>, kaj via lingvoscio multe perfektigos.

● **Akiru neforges'eb-**lan tra'vivavaĵon! Vojaĝu al *Hamburgo*!


1. tut'monda/ 2. cirkaŭ'aĵo, spaco, en kiu okazas agado.

## ĈU VI ESTAS FORTA PRI MATEMATIKO?

Jes? Nu, provu adicii<sup>1</sup> la subajn *bildojn*!

Rompu la kapon, kaj vi certe trovos la solvon! Ni malkovras, por iom helpi, ke la sumo<sup>1</sup> estas 2034.


Se vi eraris, rigardu la ĝustan solvon sur la 23-a paĝo!



1.  $3 + 4 = 7$ , tio estas adicio, kaj ĉi tie 7 estas la sumo.



# BANDITO<sup>1</sup> ESTAS SERĈATA<sup>2</sup>



Policanoj serĉas banditon, kiun atestanto pri-skribis al ili jene: Li estas viro kun ligaĵo sur la maldekstra okulo. Li havas lip'harojn kaj plas-tron<sup>3</sup> sur vango<sup>4</sup>. Kutime, li portas ĉemizon en stri-oj<sup>5</sup>. Alian notindan mar-kon li ne havas.

Kiel vi opinias, ĉu la kaŝ'policano, kiu baldaŭ en'paŝos en la drink-ejon<sup>6</sup>, trovos la serĉatan banditon?

(Solvo sur la 23-a paĝo)

1. homo, kiu vivas el ŝteloj kaj per'fortoj/ 2. kiun oni serĉas/ 3. longa mallarĝa peco da teksaĵo, kiun oni gluas sur vundon/ 4. parto de la vizaĝo/ 5. longaj mallarĝaj linioj, alikoloraj ol la ĉirkaŭaĵo/ 6. kie oni vendas vinon kaj similajn trinkaĵojn.

## Rezulto de la konkurso pri desegnaĵoj

Ni el'kore gratulas al ĉiu, kiu partoprenis en la konkurso! Jar'abonon al Juna Amiko gajnis: Ivan Jordanov (16-jara lernanto), Teksa Teknikumo, VRACA, Bulgario; Timea Moldován (10-jara lernantino), GYULA, Hungario.

Ni premiis, per donacetoj, jenajn geamikojn: Emil Ĥristov kaj Krasimir Marinov, ambaŭ el VRACA, Bulgario; István Balog, GYULA, Hungario.

La plej belaj konkursaĵoj aperos en la 4-a (septembra) kaj postaj numeroj!

Fina rezulto pri la konkurso „Vojo de saviĝo” aperos en septembro.

KARA AMIKO,

JEN VI TRA' LEĜIS LA UNUAN JAR' KOLEKTON

DE JUNA AMIKO

SE VI TROVAS ĜIN LEĜINDA KAJ APOĜINDA,

VARBU NOVAJN ABONANTOJN!

● *Hanna Stachowicz*, 17-jara lernantino serĉas leter'ami-kojn. Adreso: ul. Krótka 34/5; 43-190 MIKOŁÓW; Pollando.

● 10-jara lernantino deziras korespondi kun samaĝaj ge-knaboj. Skribu al *Anne Kromholz*; Fazenda São Pedro; 12.260 PARAIBUNA; S. P. Brasil.

● *Olja Paščenko*, 10-jara denaska E-lingvulino deziras korespondi kun samaĝuloj el la tuta mondo pri reciproke interesaj temoj. Adreso: ul. Volkova 5 A, kv. 89; SU-644064 OMSK; USSR.

● 14-jara lernantino *Olja Pandakova*; ul. Artjoma 134-20; SU-340048 DONECK; USSR deziras korespondi pri sporto, muziko, interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildkartojn.



● Kvin 15-jaraj knabinoj deziras interŝanĝi bildkartojn kaj memoraĵojn. Leterojn adresu al *Jana Nováková*; 747 87 NÁBREŽÍ 109; Budišov B; okr. Opava; ĈSSR.

● *Heiki Kalam* (14-jara knabino); Musta tee 5.; SU-202900 VILJANDI; *Estonio* kolektas kaj interŝanĝas bildkartojn, poŝtmarkojn, insignojn, sondiskojn, interesigaĝas pri artoj.

#### SOLVOJ

I. *Ĉu vi estas forta pri matematiko?*

okulo (8) + pendumilo (2000) + malsanulo (0) + akvario (4) + kosmonaŭto (9) + koko (8) + konduktoro (2) + strigo (3) = 2034.

II. *Bandito estas serĉata*

La serĉata bandito estas supre, en la dekstra angulo. Sole li havas ĉiujn markojn.

#### JUNA AMIKO

Sub aŭspicio de ILEI

Internacia Lerneja Esperanto-Revuo

de la Hungara Esperanto-Asocio (H-1368 Budapest 5. Pf. 193.). Respondeca redaktoro: BÉLA BERCELI. Redaktoro: GÉZA KURUCZ. Kunlaborantoj: D. Berndt (GDR), M. Boulton (Anglio), J. Chvosta (Ĉeĥoslovakio), Ch. Fettes (Irlando), A. Grela (Pollando), As. Grigorov (Bulgario), J. Hamvai (Nov-Zelando), L. Jevsejeva, B. Kärt (Sovetunio), E. Linz (Brazilo), U. J. Moritz (GFR), R. Okumura (Japanio), G. Ósz (Hungario), B. Ragnarsson (Islando), Z. Reĥoriĉ (Jugoslavio), J. H. Sullivan (Anglio), M. Turin (Francio), J. Zágoni (Rumanio). Grafikistoj: J. Klement (Ĉeĥoslovakio), I. Móroc (Svislando), S. Plugor (Rumanio), E. Váli, Z. Vámos (Hungario). Lingva revizio: A. Lienhardt (Francio), A. Pechan (Hungario).

Kiadói Főig. engedély száma: 93010/74.

Dürer Nyomda, Gyula



## MODERNA TEMPO



„Kion tio povas signifi?” demandas la knabo sian amikon.  
„Ver’sajne, tio estas la numero de la aŭtomobilo, kiu alvetur’igis lin”, opinias la amiko.



SinJORINO en’iras birdo’vedejon, kaj sin turnas al la vendisto:  
„Mi volas aĉeti papagon<sup>2</sup>.”  
„Mi havas nur du papagojn, kaj vendas ilin nur kune.”  
„Sed mi volas havi nur unu papagon.”  
„Mi ne donas ilin aparte.”  
„Kial do ne?”  
„Ĉar unu parolas nur en la turka lingvo, kaj la alia estas la interpretisto<sup>3</sup>.”

1. jaroj antaŭ Kristo/ 2. birdeto, kiu povas ellerni kelkajn vortojn/ 3. traduk’isto de buŝa inter’parolo.

## FANFARON’ULOJ

„Ĉu vi jam aŭdis pri Atlantiko?”  
„Jes.”  
„Mi trans’naĝis ĝin!”  
„Kaj ĉu vi aŭdis pri la Morta Maro?”  
„Jes.”  
„Ĝin mortigis mi!”

